

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA
SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

NE ISSN 0037-6558



umero 1 Unua kvarono 1988

Saluton! Jen ni, la novaj redaktoroj finfine aperas kaj ek
laboras. Ni kredas, ke ni sukcesis kvankam mankis al ni la
sufiĉan sperton por fari internacian informilon kiel LSM.
La laboro aspektis terure malfacila, sed skoltoj ne timas
kaj agadas. Ni klopodis kaj jen la rezulton.
Ni konscias, ke nia laboro multe dependas de via kontribuo
kaj ni bezonas vin, ne nur kiel gelegantoj sed ankaŭ kiel
agantoj. Nia unika maniero ekscii kion okazas en la mondo
precipe en via lando, estas viaj leteroj, artikoloj kaj kon
tribuoj. Do, agu kaj reagu!
La Skolta Movado ŝanĝas de lando en lando. Pro tio nia kon
tribuo devas esti vere internacia kaj ne nur loka. Pensu en
tio, kio povas interesi ankaŭ al aliuloj; sed tamen viaj
propraj interesoj povas trovi saminteresulojn.
i pensas montri la Skoltismon kaj la Esperantismon ĉar en
la revuo kunvenas geesperantistojn, kiuj neniam aktivis en
la Skolta Movado; kaj samtempe multaj legantoj komencas i-
liajn esperantajn vivojn pere de ĉi-bulteno. Ni prenos la
demandojnkutimaj de gejunuloj, ĉar fakte ni ambaŭ estas an
koraŭ junuloj, kaj respondos kiel eble plej ĝuste al la skol
taj idealoj laŭ B.P. proponitaj.
Ni pardonpetas pro niaj gramatikeraroj, kiujn devigas al nia
nesperto aŭ miskompreno pri kelkaj fundamentalaĵoj kaj in-
fluo de niaj nacilingvoj, certe.

Michel kaj Hector

Post la pasintjara JOTA, multaj gejunuloj komencis partopreni en radioamatorismo. Pro tio la Ĉilio Asocio de Geskoltoj decidis disaŭdigi radio-bultenojn preparita de la geskoltoj mem. La ideo vere sukcesis kaj ĉi-jare oni okazigos aliajn. Ĉiu merkredo, sur la frekvenco 7.090 Khz. (la internacia skolta frekvenco)je la 22:30 UTC eblas aŭskulti CE 3 BSC kun informoj pri la Asocio, internaciaj skoltaj renkontiĝoj kaj tro longan babilado inter geskoltoj.

Ankaŭ S.E.L. partoprenis pere de la Nacia Reprezentanto (CE 4 JLK).

Ĉu en via lando estas tiaj radio-bultenoj?Ĉu eblas krei ilin? Do, agu kaj informu nin pri tio!!!

********************************

# S E L

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Fondita en 1918

postbus 433
NL- 1500 Zaandam
Nederlando

Poŝtĝirkonto 54 36 47

++++++++++

**Prezidanto:** Franko Abriani, Via Falconetto 24, I-37131 Verona, Italio.

**Gen. Sekretario:** J. K. Hammer, Taxusstraat 7, NL-1505 AA Zaandam, Nederlando.

**Kasisto:** David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L22 3 YE, Britujo.

**Redaktoroj:**

Michel Basso, 153 Rue Clémenceau, Wintzenheim, F-68000 Colmar, Francio.

Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región, Chile.

# Atentu, skoltinoj

Dum multaj jaroj ne ekzistas speciala rubriko pri nia frata parto en la Skolta Movado. Bone, oni devus diri fratina parto: Skoltinoj.

Estus interesa ke kelkaj junulinoj povus helpi al ni en la redaktado de tiu rubriko.

Ĉu iu kuraĝas tion fari?


Se vi deziras, kontaktu nin kiel eble plej baldaŭ.

Antaŭdankojn!!!

# SERVU!

La naturo ĉie estas serva dezirego
Servas la nubo.
Servas la vento.
Servas la sulko.
Kie estus arbo plantenda,
plantu ĝin vi.
Kie estus peno, kiun ĉiuj evitas
akceptu ĝin vi.
Estu vi tiu, kiu forigas ŝtonon el vojo,
malamon el la koro,
kaj malfacilaĵojn el la problemo.
Esta ĝojo estante sana kaj justa.
Sed estas, precipe, pli bela
la eksterordinara gajo je servi.
Kia malgaja estus la mondo se ĉio en ĝi
estus jam farita;
se ne estus rozujo plantenda,
entrepreno klopodenda.
Ne priatendu nur facilaĵon.
Estas tiel bela fari tion evitindan por ĉiuj!
Sed ne eraru pri tio, ke nur meritplenigas
grandegajn laborojn.
Ja estas grandaj servoj,
kiuj estas bonaj servoj: ornami tablon,
ordigi la domon, kombi la infanojn.
Tiu estas tiu, kiu kritikadas.
Tiu ĉi estas tiu, kiu detruadas.
Estu vi tiu, kiu servadas.
Servado ne estas nur por subuloj.
Dio, kiu donas la frukton kaj la lumon,
Servas.
Li povus esti vokata tiel: La Servanto.
Li fiksis la okulojn en niaj manoj.
Ĉiutage nin demandas:
- Ĉu vi servos hodiaŭ? **Kiun?**
Al la arbo, vian amikon, vian patrinon...?

Ĉi tiu poemo apartenas al la ĉilia poetino GABRIELA MISTRAL (1889-1957), Nobelpremiita Literaturo, 1945.




ATAKO AL LA KASTELO

| | | |
|---|---|---|
| Enkonduko | : | Al manpilka ludo. |
| Ludkampo | : | Aranĝita laŭ la supra bildo. |
| Ludantoj | : | 2 teamoj po 10 ĝis 20 ludantoj. |
| Materialo | : | 1 pilko kaj 2 klegoj. |
| Por | : | Geinfanoj kaj geknaboj. |
| Aĝo | : | 10 jaraj kaj pli. |

La celo de la ludo estas faligi la klegojn per manĵetado de la pilko. Oni lokigas la klegojn meze de cirkleto, kiu ankaŭ estas meze de pli granda cirklo. La atakantoj devas faligi la klegon nur per manĵetadoj kaj la defendantoj eviti, ke tiu afero okazu. Ĉiuj samtempe defendas kaj atakas.

Por komenci la ludon, oni aranĝas "inter-du"an salton kun du ludantoj el ĉiu teamo, tiamaniere ke ili lokiĝu unu antaŭ la alia. La ceteraj partoprenantoj disiĝas tra la kampo. Ĉiu teamo havos kleg-prizorganton ene de la areo formita de la du cirkloj, kaj ili ne povas blokigi la kontraŭan kleg-prizorganton. La ĵetadojn oni povas fari el kie ajna loko el la ludkampo.

Kontraŭleĝaĵoj:

Oni punos per flanka ĵetado favore al la kontraŭa teamo, la jenajn kontraŭleĝaĵojn:

1) Doni pli ol 3 pasojn kun pilko ĉe-mane.

2) Penetri la grandan cirklon;
3) Foriri el la ludkampo kun la pilko;
4) Jeti la pilkon for el la ludkampo;
5) Jeti kontraŭ la celo el fora parto de la ludkampo;
6) Ludi aŭ tuŝi la pilkon per la piedo;
7) Doni pli ol du resaltojn al la pilko.

Oni punos per "inter-du"-a salto, kiel ĉe la komenco, la jenajn kontraŭleĝaĵojn:
1) Puŝi la kontraŭlon;
2) Provoki puŝbatalon;
3) Deteni la pilkon inter du ludantoj.

Oni punos per flanka ĵetado, la jenajn kontraŭleĝaĵojn:
1) Penetri la malgrandan cirklon;
2) Eliri la grandan cirklon (kleg-prizorgantoj);
3) Bloki la pilkon per la mano.

POENTOJ: Pri tio oni devos interkonsenti unue. Ĝenerale, kiam oni sukcesas faligi la klegon kontraŭan, la teamo gajnos poenton.

Se oni decidas, ke eblas ankaŭ mortigi la kontraŭajn ludantojn, oni donos poenton po mortigita ludanto kaj 5 po faligita klego. Sed tio, vi mem decidos!

Nun, ludu ĝin kaj ŝanĝu la regulojn, klopodante elpensi novan ludon! Hej, rakontu nin pri ĝi ankaŭ!!!

F



.... En pelveto sin spegulante, li vidis sian bildon plibeligita per admirinda paro da azenetaj oreloj.

F

## LUDKARTOJ

Eble vi jam konas la historion pri Pinocchio (Pinokjo). Tiu ĉi nova ludkarto montras la historion de ligna knabeto, kiu devis trapasi multajn eventuroj ĝis estigi veran knabon.
Nun, en Italio, aperis ludkarto pri lia historio en facila E-o; konsistas el ĉ. 40 kartoj, sur kiuj aperas etajn rakontojn. Ni ne scias kie vi povas aĉeti ĝin, sed vi povas demandi al nia Prezidanto Franko Abriani, kiu sendis la informojn

# SKOLTISMO
# NE ESTAS....

de Baden Powell.

Jen, do, tion kion Skoltismo ne estas. Ne estas bonfaraĵo direktita de la monda popolaro por la bono de malriĉaj geinfanoj.

Ne estas lernejo, kiu havas studplanojn tute definitaj, kaj programerojn.

Ne estas militista trupo el oficiroj dediĉitaj al donado, pere de ekzercado kaj ordonoj, de vireco al la knaboj.

Ne estas eta oficejo por sendi mesaĝojn por la komforto de la publiko.

Ne estas ekspozicio kie la rezultoj atingitaj es- tas disdonitaj per meritinsignoj kaj medaloj.

Tio estas la ekstero, dum la skolta edukado venas tute el la eno.

La estro ne devas esti nek lernejinstruisto, nek trupoficiro nek pastro, nek monitoro. Oni nur demandas lin trovi la prezuron de la vivo je libera aero, eniri la dezi- rojn de la knabaro, povi renkonti la ulojn kapablaj por do- ni la deziratajn informojn ĉu pri bokso ĉu pri fluto, ĉu mekaniko ĉu historio.

Endas ke li prenu la pozicion de pliaĝa frato, kiu rigardas la aferojn el vidpunkto de la knaboj; kiu povas i- lin gvidi, entuziasmigi ilin marŝi tra la bona vojo. Tio estas ĉio.

La Skoltismo estas tre vigla frataro, kie estos pli da vigleco sufiĉe granda por eniri la malfacilan batalon kon- traŭ la egoisma kulto.

En la tria loko, estas tasko por la estro - kaj ĉi tiu tasko estas la plej interesa- malkovri kaj eltiri de ĉiu knabo, tion kion en li estas inda kaj pli bona por klopodi disvolvi ĝin; kaj tion kion estas malinda kaj malbona por porti ĝin al la bona vojo. Estas 5% da boneco, eĉ en la plej terura karaktero.

La ludo konsistas en disvolvi kaj malkovri ĝis 80 aŭ 90% tiun bonan parton en ĉiu knabo. Tio estas edukado, kaj ne plu instruado.

(El la libro Gvido por la Skolestro,
Baden Powell, Londono 1919)

# SKOLTISMO SALONE



# NE, DANKON!


# KORESPONDU

NIGEL GOODWIN, 16jara junulo; 11 Bankside, Hightown Liverpool, L38 9EL, Britujo.

OLAVO FAUSTINO; Av. Olegário José Guimaraes 494, BR-94.800 Alvorada,(RS) Brazilo.

VICTOR OLMOS DE AGUILERA CAMPOS, 24jara junulo, deziras korespondi tutmonde kun gejunuloj pri popola muziko kaj interŝanĝo de Poŝtmarkoj. Adreso: Avenida Simón Bolivar 6423, La Reina, Santiago, Ĉilio.

YOSEF MOSAYEBI; 17-jara studento kaj komencanto de ziras korespondi. Adreso: Nu. 21 K. Ameinei, 3 Ramzanpor, Ghaem Mahalleh, Ghaem Shahr, 47619 Mazandaran, Irano.



**APLIKOJ**

## LA KVADRATA ĈIRKAŬVOLVO.

Oni uzas ĉi tiun volvon por kunigi du stangojn, trunkojn aŭ tubojn krucigitajn en rekta angulo.


Oni komencas kun mastkroĉo aplikita tre forte ĉirkaŭ la vertikala stango kaj sube de la horizontala stango.

Poste oni devas ĉirkaŭigi la stangojn per la ŝnuro, kun tri aŭ kvar plenaj turnoj, klopodante, ke ĉiu turno estu interne en la vertikala kaj ekstere en la horizontala stango.

La ŝnuro devas ĉiam esti streĉita, tiel la volvo estus pli firma.

Oni finas la tutan volvon per la sama mastkroĉa noto kiel ĉe la komenco, sed ĉifoje sur la horizontala stango.

Praktiku ĉi tiun volvon, ĉar ĝi estas ja utila por konstruaĵoj kiel pontoj kaj ŝtuparoj.



La pasintan jaron okazigis la 30an Ĵamboreon-per-la-aero, aŭ pli konata en nia skolta medio kiel JOTA. Antaŭ la konstato, ke multaj gejunuloj neniam povus partopreni la plej elstaran okazintaĵon en la skolta vivo, la Mondan Ĵamboreon, oni pensis kontakti la gejunulojn per radio. En tiu ĉi parto radioamatoroj havis tre gravan rolon, ĉar devis instrui al la geskoltaro kiel uzi la tutan aparataron. Certe, estis pluraj problemoj, precipe, leĝaj ĉar en kelkaj landoj oni malpermesas uzi radioaparaton al malplenaĝuloj.

La unua rendevuo okazis do, kompreneble en Eŭropo, en la jaro 1957: nur du stacioj partoprenis en la evento.

La tampo ja pasis kaj la rimedoj pliboniĝis. Nuntempe eblas kontakti multe pli landoj ol antaŭe kaj kun pli da fideleco, kaj certe kun malpli da ĝeno.




La JOTA okazas ĉiun trian semajn-fino de Oktobro kaj povas partopreni ĉiu lupido, skolt(in)o, rover(in)o kaj skoltestr(in)o. Se vi deziras partopreni, kontaktu vian lokan radioklubon aŭ iun radioamatoron, kiuj certe helpos al vi; klopodu ĉiam havi ĉe-mane informojn pli via lando, urbo kaj skolta grupo; kaj se eblas lerni kelkajn vortojn en fremdajn lingvoj. Kompreneble ne forgesu paroli iom pri Esperanto, ĉar estas multaj radioamatoroj kiuj uzas ĝin.

Ne ĉiam la afero bone funkcias, sed kiam vi sukcesas, vi povas renkonti interesan ulon aŭ ulinon kaj longe paroli kaj korespondi, eĉ viziti unu la alian. Sed, atentu! En kelkaj landoj nur la posedanto de la radiostacio eblas paroli per radio. Tiam vi devos prepari ĉion skribite kaj la radioamator(in)o legos kaj informos al la kontaktitoj. Ne forgesu respondi sendante "konfirmilon", t.e., poŝtkarton aŭ leteron per kiu vi atestas la kontakton.

Eble poste vi interesiĝos pri radioamatorismo, kaj venos al la radioklubo por demandi kiel fariĝi radioamatoro. Nu, tio ja estas interesa afero! Se vi jam havas pli ol 12 jaroj vi povas fariĝi tia, eĉ 9 en kelkaj landoj!

Kiam vi havus vian propran licencon, ĉar radio ne ĉiam estas bezonata - vi povas uzi radiokluban aparataron- vi ...

povos ĝui certe la hobion: kontakti novajn kaj interesajn personojn, ekkoni urbojn kaj landojn kiel Ĉinio, Nigerio Nepalo ktp. kaj sperti novajn teknikojn.

En nia Esperanto-Movado ekzistas kelkaj "rondojn" kie radioamator(in)oj el Eŭropo, Azio kaj Ameriko partoprenas ofte. Eĉ oni konkursas kaj havas diplomojn por tiuj, kiuj sukcesas kontakti 100 radioamatorojn esperantistajn.

Radioamatoj iom similas al la skoltoj: ili servas al la ĝenerala publiko kaj ne ricevas rekompencon pro tio. Kelkaj el ili donas interesajn helpojn internacie serĉante kuracilojn ne troveblaj en sia propra lando.

Pensu pri la afero. Eble tre baldaŭ ni renkontiĝos en la aero kaj babilados tie dum horojn. Ĝis la re...aŭdo!

TITO, CE 4 JLK





# Aŭstralio

## 200 JARA LANDO, SED ANKORAŬ JUNA

Ni elkore salutas al nia Aŭstralia leganta-ro, okaze de la 200-jariĝo de tiu lando-kontinento. Ni esperas ke via lando longe prosperu kaj helpu al la monda longataro donante eblecojn por frenduloj kiuj devas lasi sian propran patrolandon por kia ajna kialo. Tio ja estas bona prezent-karto de Australio, lando de paco kaj espero.

# GRATULOJN!


Ĉu vi scias, ke nur tri nombro-sistemoj estas la plej perfektaj en la mondo? Jes! Ili estas la ĉina, la japana kaj... tiu el la araŭkanoj. Tiuj praloĝantoj el Ĉilio havas eĉ pli taŭgan nombro-sistemo ol tiu de gekroj, araboj aŭ hispanoj. La verkinto de la libro "Araŭkana Nombro-Sistemo" kaj araŭkano, membro de la Ĉilia Akademio pri Sciencoj, Lonk Kilapán konkludis tion post serioza esplorado kaj serĉado. Laŭ li tion mon-tras ke en tiu sudamerika lando estis supera kulturo antaŭ la alveno de la hispanoj.





La dormemaj lernantoj el Morgan Park High School en Ĉikago, Ilinojso (Usono), komencis ricevi specialan telefonalvoko de la lerneja komputilo. Ĉiu lernanto, kiu malfruiĝas pli ol kvar fojoj monate, ricevas alvokon je la 6a. matene. La komputilo ĉesas alvoki telefone kiam la lernanto ne plu malfruiĝas. Ĝis nun la sistemo funkciis tre bone kaj duono el la dormemuloj jam vekiĝas frue kaj alvenas ĝustatempe al la lernejo. Ni pensas apliki la sistemon al nia esperantista amikaro sed ni riskas bankrotiĝi!!!

Aperis la nova eldono de la tre grava kaj interesa P.I.V. Komprenēble tiu verko estas ja necesa libro en ĉies biblioteko. Bedaŭrinde la prezo estas iom alta.



"Rover Moot '88"

# Encuentro internacional de scouts en Lautaro

## Se trata de un *Rover Moot* que se realiza por primera vez en Chile

Okaze de la venonta 80-jariĝo de la Ĉilia Asocio de Geskoltoj en 1989, oni preparis multajn internaciajn skoltrenkontiĝojn. La pasintan jaron estis la Skolta Latinamerika Ĵamboreo en Panguipulli (pron. Pangipuĝi) kie partoprenis ĉirkaŭ 8.500 geskoltoj, el 12 landoj. Ĝi fariĝis la plej granda renkontiĝo por gejunuloj inter la aĝoj 11 kaj 16.

Ĉi tiu jaro la renkontiĝo estis por la roveroj, inter la aĝoj 16 kaj 20. La partoprenintaro konsistis el 3.500 gejunuloj el 13 landoj, kaj estis unu observantino el Portugalujo.

La vilaĝo Laŭtaro estas meze de la 9a Regiono de Ĉilio kie loĝas membrojn el la unuaj loĝantoj de tiu lando. Komencis la renkontiĝo la 30an de januaro kaj finis la 6an de februaro 1988. La vojaĝo oni faris per trajno kaj daŭris ĉ. 9 horojn. Por la argentinanoj kaj urugvajanoj la tutan voĝajon estis pli ol 42 horojn. La brazilanoj atingis la landon aviandile, kaj la aliaj uzis aŭtobusojn, aŭtojnkaj eĉ biciklojn.

La lingva problemo konsistis nur klopodi la brazilanojn kompren-i kiam ili parolis rapide, kaj inverse. Sed pro la simileco de la lingvoj estis pli malmulte ol la pensitaj.

Multaj metiejoj samtempe funkciis: teatra, artaĵoj, kultura interŝanĝo, ludoj, radioamatorismo kaj publika disvastigado.

La novaĵo de tiu ĉi evento estis la uzado de komputilo por prizorgi la aliĝilojn kaj serĉado de ĉiu partoprenanto kiam estas iom urĝa; kaj ankaŭ la hospitalo, kiun prizorgis eks-geskoltoj, nuntempaj kuracistoj, kaj flegistinoj.

Por la venonta jaro oni planadas multajn aliajn renkontiĝojn, eĉ por geskoltestroj kaj funkciuloj en Naciaj Skoltasocioj.